

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Redaktoroj: S. Alberich - Jofrè, Delfí Dalmau, Marian Solá

L'ús de l'Esperanto

Aquest any, del 14 al 17 de maig, tindran lloc a París dues conferències tècniques: la una per a l'ús de l'Esperanto en el comerç i la indústria, sota el patronat oficial i subvencions de la Chambre de Commerce i de la Fira de París. L'altra per a ús de l'Esperanto en la Ciència, sota el patronat de molts membres de l'Acadèmia de Ciències de París — entre ells Charles Richet, el qual ha escrit: "L'Esperanto és un idioma precís com el francès, harmoniós com l'italià, capaç com el grec."

De l'1 al 8 d'agost següent, a Ginebra seran fets en Esperanto els cursos universitaris d'istiu de la Universitat fundada a Brusselles per Otlet i Lafontaine. Entre els professors d'aquests cursos en Esperanto hi ha eminències com Pierre Bovet, director de l'Institut J. J. Rousseau, de Ginebra, la més famosa institució pedagògica del món, i Charles Baudoin, que en aquestes mateixes planes ha estat dit que és un del psicòlegs més avançats. Jo us invito a concórrer als dits cursos universitaris i constaris, tareu que cap altre d'aquesta mena en anglès o francès ha tingut el nombre i diversitat d'inscrits que tindran aquests en Esperanto.

extret d'un article de «La Publicitat» del dia 14 - 12 - 924.

ATENTU, LEGU, KOMPRENU



Nur maŝinskribitaj manuskriptoj sur unu flanko de ĉiu paperfolio, ĝenerale korektaj en kataluna aŭ esperanta lingvoj estas akceptotaj

Ĉu akceptitaj aŭ ne, originaloj neniam estas resendotaj

«Deklaracio pri Esperantismo» — (Akceptita de la Unua Kongreso, en sia lasta kunsido) — Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantajn klarigojn — 1 La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu «ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniam celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn», donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata por kiu la Esperantismo ne respondas»

El «Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia» — «Fundamenta Krestomatio» — Per si mem la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena ekflorado: dank' al la neceseco ellernadi diversajn fremdajn lingvojn, oni nun malofte povas renkonti homon, kiu posedus perfekte sian patran lingvon, kaj la lingvoj mem, konstante kunpuŝiĝante unuj kun la aliaj, ĉiam pli kaj pli konfuziĝas, kripliĝas kaj perdas sian naturan riĉecon kaj ĉarmon»



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio : Carrer València, 145 - BARCELONA

La kiso sur la okuloj

Pro abelfluga kis' subita,
okul' kliniĝas kvazaŭ flor';
kaj en okul', pro tim' fermita,
pupilo batas kiel kor'.

Kis' sur okul'... Ho, kia brilo,
de mia kiso sub la varm',
en la de tim' plena pupilo,
kvazaŭ birdet' en iu man'!

Aromas jam estonta ploro
sub la palpebroj en ridet';

kaj kun flugila mov-fervoro
batas pupil' en malkviet'.

Kaj ĉirkaŭ ni la tempo fluas
en faŭk-abismon en mallum'.
Mi ĉe l' okuloj viaj ĝuas,
de viaj vidoj je l' parfum'.

En kaptitec' via pupilo,
kiel alaŭdo en la man',
movadas sin kvazaŭ flugilo
por flugi for kun arda varm'...

GABRIEL ALOMAR

(Baleara poeto)

El la kataluna lingvo tradukis
JAUME GRAU CASAS

La Amo al la Birdoj

Unu el miaj plej fruaj rememoroj el mia infaneco jam rilatas al la birdoj.

Dum tre malvarma vintro pasereto duonmorta pro frosto venis en nian ĉambron. Evidente plaĉis al ĝi la varmo, ĉar ĝi restis kaj fariĝis baldaŭ malmimema, eĉ familiara. Sed, ho ve! mia patrino ĝin mortigis iumatene tute neintence perpiede. Mi ploregis, ploregadis kaj ne volis plu vivi sen mia amata pasereto.

Ĉi tiun etan epizodon mi rememoris, kiam mi legis la supran temon en la konkursoj de la ĉi-jaraj Internaciaj Floraj Ludoj, kaj ĝi ankaŭ instigis min, skribi kelkajn liniojn.

Mi ne estas ornitologiisto, kiel oni science diras. Mi amas la birdojn, sen ke mi sentas la devon ilin klasifiki laŭ ordoj kaj specoj. Mi amas ilin instinkte.

Okupante min jam kun la ideo partopreni en la konkurso, mi promenis iutage en la kamparo. Brilaj varmaj sunradioj flatis la teron kaj invitis min, eksidi sub ombrodonanta arbo. Tra la delikata foliaro lumetis la blua ĉielo. Kaj je mia granda ĝojo birdo sidis sur malsupra branĉo. Ne miru, ke mi ekkomencis paroli kun ĝi, ĉar ĝi okulumis min tiel saĝe, tiel aminde, ke mi tuj divenis, ke ĝi estas ne ordinara birda estaĵo.

«Vidu birdeto», mi ekdiris, «mi deziras skribi iom pri la amo al vi birdoj. Ĉu vi eble povus iel helpi min?»

Kaj je mia ega surprizo la birdeto respondis klare:

«Ho jes, tre volonte. Mi scias ke vi amas nian genton, kaj mi volas tion rekompenci laŭ mia poveto».

«Koran dankon, bela plumulo», mi diris; la birdeto ridetante korektis: «plumulino».

«Do, dankon, graciulino», mi daŭrigis. «Ĉu vi bonvolus aŭdigi kelkion pri la citita temo?»

«La amo al ni birdoj», instrutone ekpensis la birdineto, «havas diversajn motivojn. Mi diros la plej gravajn miaopinio. Estas unuavice nia utileco. Ni, la libere vivantaj, plenumas la gravegan oficon de policistoj de la kamparoj. Kiu povas nombri, kiom da malutilegaj raŭpoj, limakoj, vermoj, skaraboj, muŝoj kaj kuloj ni formangas ĉiujare? Neniu! Estas cifero neimageble granda. Sen ni, viaj kampoj, ĝardenoj, arboj kaj herboj pli-malpli frue estus pereigitaj de tiu fi-insektaro. Kaj al la homoj mankus ĉia nutraĵo vegetara. Pripensu la sekvojn! Ĉu do ne estas nature, ke la homoj nin amas?»

Alian utilon alportas al vi la dombirdoj. Ĉu rajte, ĉu malrajte vi homoj tenas kreaĵojn niaspecajn kaptitaj, tiun demandon ni ne esploru. En la daŭro de jarcentoj kaj jarmiloj ili ne plu konscias, ke ili estas malliberuloj de la homo. La ĉiama bredado estingis en ili la fajron de la liberemo. Nun ili estas necesegaj kaj utilegaj al vi. Multaj donas ovojn kaj bongus-

tan viandon, kelkaj molajn plumojn por viaj litoj, aliaj faras servojn, kiuj jam savis homojn el grandegaj danĝeroj kaj mizero. Mi aludas la leterkolombojn. Ili ĉiuj estas efektivaj bonfarantoj al la homoj. Ĉu tial ili ne povas postuli amon?

Sed ne sufiĉas. Kiu ornamas la ĉapelojn de viaj edzinoj kaj filinoj per la plej bela ornamaĵo? Ĉu ne estas anoj el nia gento? Struto, ardeo, paradizbirdo — mi nomas nur la plej ĉefajn — donas siajn plumojn por viaj virinoj. Mi povas tion des pli bone kompreni — la birdino iom gemis — ĉar ĉe ni la inoj malhavas tiun kutimon. Ĉe ni la viretoj estas la koketuloj. Ili portas la pli brilan plumveston. Inter la homoj ja ne ekzistas viroj-koketuloj, ŝi iom ironie aldonis. «Do, viaj inoj havas pluan kaŭzon por nin ami.

La lastan, eble plej gravan utilon mi ne povas ne menci. Vi ja konas la familion de la cikonioj kaj tute ne ignoras, kiel netakseble gravaj ili estas rilate al via idaro.» Tiam ŝi iomete honteme ridetis. «Mi ja bone scias, ke vi homoj maturaj, grandaĝaj, kleraj, skeptikaj ne kredas tion. Sed viaj infanoj ĉie amas tiujn birdojn, kiuj ĝentile alportas frateton aŭ fratineton.»

«Pardonu, ke mi interrompas», mi diris. «Ĉio de vi citita estas vera kaj ne kontraŭdirebla. Tamen ekzistas homoj sen amo al viaspecaj estaĵoj. Ili asertas, ke vi kelkokaze eĉ damaĝas formangante la semitajon aŭ la maturajn grenerojn el la spikoj.»

«Jes, parte vi estas prava. La paseroj, tiuj sentaŭguloj ekz. tiel agas kelkfoje. Sed ĉu la kaŭzita damaĝo efektive estas tiel granda? Mi neniam aŭdis ĝis nun, ke la homoj tial ne havis sufiĉe por manĝi. Cetere, ĉar vi parolis pri malutilo, bonvole pripensu ĉu pro tio la homoj havas la rajton nin kapti, rosti kaj manĝi, kiel okazas en kelkaj landoj? Ĉu tio estas justa? Ĝi estas nekomprenebla barbarajo! Sed la homoj ja eĉ buĉegis unu la alian plej kruele, kion mi mem vidis antaŭ malmultaj jaroj en diversaj partoj de la tero!»

«Sed por daŭrigi nian temon mi diras, ke ni estas amindaj ankaŭ pro nia aspekto kaj precipe pro nia kantarto. Ĉu ni ne estas gracia gento? Rigardu tiun kinereon, kiel elegante ĝi promenetas tie sur la ŝtonoj de la rivereto. Ĉu estas iel imitebla la koketa vostmometado? Aŭ vidu la hirundojn, kolombojn kaj mevojn, kun kiu nesuperebla arto ili trafugas la aeron, farante jen bele proporcian spiralon, jen sagorektan linion de multaj metroj. Kaj la grandaj reprezentantoj de nia popolo, aglo, vulturo, akcipitro, kiel majeste ili ŝvebas ofte milojn da metroj alte en la etero. Iufoje ili ŝajnas flugpendi tute senmove, donante al la rigardantoj veran impreson pri birda majesteco.

Alia kaŭzo, pro kiu homoj nin amas, estas la beleco kaj multkoloreco de nia pluma vestaro. Precipe viaj inoj ŝatas tion, kiel mi jam diris. Kaj vere ekzistas kelkaj inter la birdaro, kiuj reprezentas kaj eĉ superas la

pompan ĉielarkon rilate brilkoloron. Kiu ne ŝatas la admiregindajn trogonon kaj paradizbirdon? kaj nialande la fieran pavon? Sed ankaŭ la modeste vestitaj plaĉas ĉiam pro la ĉarmo de la delikata pluma vesto.

Sed la ĉefa kaŭzo haviganta al ni la homan amon estas la potenco de nia kantarto. Kompreneble ekzistas bonaj kaj malbonaj kantistoj inter ni. Sed kiam dolĉe, kortuŝe flutas nia kantregino najtingalo dum varma somernokto kaj ŝia voĉo jen tremas, jen jubilas mirige, ĉu iu estaĵo povas ne ami tian artistan birdeton? Aŭ kiam oni frumatene promenas tra vekiganta arbaro kaj multaj birdetoj ĝojkantas kaj sur la kampoj trilas la alaŭdoj, ĉu oni tiam ne sentas profundan emocion?

La plej konvinka pruvo, kiel multe la homoj amas nian kantarton, estas ke ili bredas ekzemple la kanarion pro ĝia kantotalento. Kiom da fojoj ĝi antaŭsorĉis al malfeliĉaj loĝantoj de urbegoj aŭ al homoj katenitaj pro longdaŭra malsano al lito, per la potenco de sia gorgo kaj lango revojn pri trankvila, paca kamparo, mallaŭte bruetantaj arboj en malvarmetiga venteto, senfina floranta erikejo. Kaj la homo alforĝita al mallarĝaj stratoj, altegaj domoj kaj polvoplenaj laborejoj vidas kaj amas en sia birdeto la korpigon de ĉio tio, kion li estas devigata malhavi.

«Ho, vi estas pravega, kara birdineto», mi interdiris emociite.

«Fine mi ne povas preterlasi mencii, ke la homoj nin birdojn amas ankaŭ el instruaj kaj sciencaj vidpunktoj.

Kio estas pli bela, pli trafa simbolo de la familio, de la hejmo ol ekz. la hirundo? Diligente ĝi konstruas sian neston, ameme ĝi kovas, nutras kaj edukas siajn idojn. Kaj la facilanima pasero estas nesuperebla modelo de optimismo. Senzorge ĝi vivas plenkonsvinkite, ke la sekvonta tago donos al ĝi la necesan nutraĵon. Ĝi estas ĉiam gaja, eĉ dum vintro ne perdas la vivkuragon.

Al la homoj okupiĝantaj kun la birda mondo, ĝi prezentas interesajn problemojn. Ĉu la longaj migroflugoj, kiujn entreprenas ĉiujare multaj el ni, ne devas mirigi ĉiun pensmulon? Kaj al kiu ŝuldas la homoj la flugmaŝinon, entute la ideon, regi ankaŭ la regnon de la aeroj? Nur al la birdoj! Vi certe scias, ke jam en la antikva greka mitologio estas rakontite pri Dedalo kaj Ikaro, la unuaj flughomoj.

Do, vi vidas, amiko, ke ni birdoj meritas vian amon pro nia utileco, korpale kaj kantarto. Ni meritas ĝin pro la gravaj instigoj, kiujn ni donas al vi laŭ socia, instrua kaj sciencaj vidpunktoj. Rekompence vian amon ni plibeligas la tutan naturon kaj eĉ vian propran vivon.»

Mia birdino-amikino eksilentis. Post kelkaj gajaj pepoj ĝi forflugis, antaŭ ol mi povis sincere danki al ŝi.

Mi ekstaris por iri hejmen, ĉar vesperigis. La tuta kamparo estis ornamita de la lastaj sunradioj. Ĉirkaŭ mi en la foliaro de la arboj eksonis multvoĉaj birdokantoj vesperaj.

Kiam mi venis al la rivereto, penetris al mia orelo la dolĉaj flutmelodioj de najtingalo.

Kanto de vagabondo

Premiita Ĉe la I. F. L.

La polv' sur mia plando :
 Jen estas mia lando.
 La lito estas ĉies ter',
 Kovrilo mia la vesper'.
 Birdar' al mi deĵoras
 Per amuzanta ĥor',
 La nuboj min priploras,
 Se tuŝas min dolor'.
 Hej, hola! Kia granda ĝoj!
 Facila vag' sur landa voj'!

Mi vagas preterfluge,
 Sencele kaj senjuge,
 Kaj al knabino, al amik'
 Neniam ligu min radik'.
 Radiko ja profunde
 Penetras en la ter.
 Kaj ĝi ŝiriĝos vunde.
 Ni ŝparu je sufer'!
 Hej hola, kia granda ĝoj!
 Ensola vag' sur landa voj'!

En blu' de l' malproksimo
 Sin banas la animo,
 Dum inter prema ĉambra lim'
 La koron kovras ranca ŝim'.
 Filistro - invalido

Do putru en la niĉ'!
 Mi saltas el la sido
 Kriante pro l' feliĉ',
 Se vokas min por granda ĝoj',
 Por nova vag' la landa voj'.

Se lumas sort' se nigras,
 Mi prifajfante migras,
 Kaj kiam kontraŭ la stomak'
 Malsato venas por atak':
 Dum la stomak' eksonas
 Grumblante kun riproĉ',
 Mi fajfe primon donas
 Al ĝia basa voĉ'.
 Hej, hola! Kia granda ĝoj'
 Eĉ la malsat' sur landa voj'!

Kaj se pleniĝis listo
 Kaj venos la Falĉisto,
 Post mi edzino kaj infan'
 Ne ploros orfe kaj sen pan'.
 Mi falas en la neĝo.
 — Adiaŭ bela vag'!
 Kaj la primorta preĝo
 Nur estos korva grak'.
 Anoncos poste hunda boj'
 Kadavron sur la landa voj'.

KOLOMANO DE KALOCSAY



Bulgaraj Popolaj Kutimoj

Premiita ĉe X^a I. F. L.

Belaj popolkutimoj kaj ilin akompanantaj ritoj restis ĉe kelkaj popoloj de la malnova idolana tempo. Kiel tradicioj ili diversigas kaj plidolĉigas la nunan vivon. Jen kelkaj el ili, konservitaj ĉe la bulgaroj.

LA NOVA JARO

Unu el la plej belaj festoj dum la vintro estas la festo Nova Jaro aŭ Surovako, netradukebla vorto, signifanta proksimume : saluton kaj bondeziron per frapado. Ĝi estas festo precipe por la infanoj. Ĉiu el ni gardas en sia animo la belajn memorojn de la infaneco pri tiu festo.

La vesperon antaŭ la nova Jaro estas nomata *budna večer* (laŭvorte : maldorma vespero). I En la kamenon de la ĉambro, kie estos renkontata la Nova Jaro, oni metas grandan ŝtipon (*budnik*), kiu brulas kaj bruletas ĝis la mateno. Por la vespermanĝo estas aranĝata la tablo, sur kiun oni metas tutan panon kun bruligita vakskandelo sur ĝi, kompoton, manĝaĵon de porkokapo, kukon kaj fruktojn. Antaŭ ol la vespermanĝo komenciĝas, la plej maljuna persono en la domo metas vivantajn karberojn kaj Smirnan timianon en la incensilon kaj incensas la manĝotablon kaj la tutan domon. Interne en la kuko estas antaŭe metitaj bone ellavitaj arĝentaj kaj nikelaj moneroj, por provi la ŝancon. La kukujo estas metata sur la manĝotablon kaj la kuko estas tranĉata je tiom da pecoj, kiom estas la personoj sidantaj ĉirkaŭ ĝi. Ĉiu prenas la pecon antaŭ si kaj ĝin malfermas por vidi ĉu li gajnas moneron. Kiu gajnas moneron, tiu estos feliĉa kaj riĉa dum la jaro. Grandan feliĉon havos kaj donace ricevas monon tiu, kiu ternas je la 12-a horo nokte.

La infanoj, knaboj pli aĝaj ol ses jaroj, kuŝiĝas frue, ĉar la matenon antaŭ krepuskiĝo ili iros *surovaki*. La *surovak'ilo* estas pretigita jam du tagojn antaŭe. Ĝi estas branĉetohava kornusvergo, ornamita per alligitaj sur ĝi diverskoloraj rubandoj, paperstrioj aŭ ruĝaj kaj bluj diversdikaj lanfadenoj. Ordinare al la surovakilo oni ligas ankaŭ ormoneron. Frumtene la patrino vekas la infanojn, vestas ilin en la plej novaj vestoj kaj ilin forsendas por *surovaki* la parencojn kaj konatulojn. La stratoj de la vilaĝo estas plenigataj de vivo — bruparolo, krioj, kantoj. La infanoj marŝas ordinare pogrupo duope aŭ triope. Kiam ili alvenas al la domo, kie ili surovak'os, ili ekfrapas forte sur la eksteran pordon kaj vokas laŭtvoĉe la do-

momastrinon por malfermi al ili. Enirinte, ili komencas surovaki, frapante sur la dorso ĉiun de la familio kaj samtempe dirante :

Súrova, súrova godína,	Saluton, bondeziron por la novjaro,
Vésela godína,	Estu gaja la novjaro,
Ĉervéna jábolka v gradína,	Ruĝa pomo en la ĝardeno,
Pálna kásta s koprína,	Plena domo je silko,
Jívo zdrávo do godína,	Estu vivaj kaj sanaj ĝis la venonta,
Do godína do amína.	Ĝis la venonta jaro kaj por ĉiam-

La surovak' antoj surovak'as ankaŭ tiujn, kiuj ankoraŭ dormas, frapante pli forte, por ilin veki. Post kiam ĉiuj estas surovakitaj, la domomastroino disdonas al la infanoj monerojn, nuksojn, aveleojn kaj aliajn sekajn fruktojn. Tiamaniere la infanoj vizitas la vilaĝon ĝis la mateno kiam ili revenas hejmen. Antaŭ ol reheimiĝi ili ĵetas sian surovakilon ordinare sur la tegmenton de iu domo. La surovakilo ne devas esti kunportata hejmen, ĉar alie estos multaj puloj dum la jaro.

Kontraŭ la Nova Jaro, samkiel dum la tago de 1. Januaro, estas provata la ŝanco per krevado de kornusburĝonoj. Oni kolektas burĝonojn de la surovakilo kaj unu post alia ili estas metataj sur ardantan karberon apud la kameno, antaŭ kio oni dediĉas la burĝonon al iu el la membroj de la familio, al la ŝafaro, al la grenkampo, vinberejo, ktp. Pro la ardo la burĝono varmigas, grandigas kaj krevas forsaltante de la karbero. Se la burĝono bone krevas kaj forte saltas, tio ĉi signifas feliĉon por tiu, al kiu ĝi estas dediĉita aŭ fruktabundecon de la grenkampo, vinberejo, ktp.

Kvankam la Nova Jaro estas festo por la knaboj, tamen ankaŭ la knabinojn ligas ĝojaj memoroj kun ĝi.

Je Silvestro (de *Sylva* — arbaro kaj estro — reĝo), kontraŭ la Nova Jaro, la knabinoj de la kvartalo kunvenas en iun domon por provi sian ŝancon. Ili prenas kupran kaldroneton, metas sur ĝian fundon tavolon de aveno kaj ĝin plenigas je akvo. Ĉiu knabino estas pretiginta sian ringon, per kiu ŝi provos sian feliĉon dum la nova jaro. Ĉiuj ringoj estas metataj en la kaldroneton kaj oni miksas ilin bone kun la aveno. Post tio ili ekkantas :

Propáren petél	Brogíta koko
Prez dol bjága;	Tra valet' kuras;
Carvúl stjága,	Ledŝuo premas,
Njágo móje.	Karulino mia.

La lasta verso estas kiel rekantaĵo en ĉiu strofo. Post la finkanto de ĉiu strofo, kiu signifas iun viran metion, iu knabeto metas la manon en la kaldroneton kaj eltiras unu ringon. Al kiu knabino apartenas la ringo, tiu edziniĝos je tia, kian montras la finkantita strofo : paŝtisto, kaldronisto, ĝardenisto, skribisto, urbano, fremdulo, ktp.

Mono ne feliĉigas

Menciita ĉe X^a I. F. L.

Estas malnova veraĵo, ke la mono ne feliĉigas. Tamen ĉio dependas de la mono kaj ĉiuj svatas la monon. Sed la historio kaj la sperto pravas ke nur kontenteco kaj kutimiĝo feliĉigas. Ofte oni envias sian najbaron aŭ sian amikon pro iliaj riĉaĵoj aŭ ilia situacio en la societo; sed oni ne pripensas ke ĉiu homo sin adaptas al sia situacio, ke la malriĉulo kutime ne estas pli malfeliĉa ol la riĉulo, kaj ke la riĉulo ne estas pli kontenta ol la malriĉulo. Ni ĉiuj scias, kiom malfeliĉaj ni nin sentas, kiam ni suferas pro iu ajn korpa doloro, kaj ke en tiaj momentoj ni pensas: «Se nur miaj doloroj ĉesus, kiom feliĉa mi estus!» Sed tamen post kiam la doloro nin forlasis, ni estas, post la unua ekĝojo pri la pliboniĝo, neniel pli feliĉaj ol antaŭe. La kutimo ne plu suferi doloron, baldaŭ fariĝas ĉiutagaĵo kaj ĉio estas kiel ĉiam estis. Kiom multaj ja pripensas, kion ili efektivigus se ili posedus multe da mono, sed ili ignoras ke la kapableco de la homo, sentadi feliĉon kaj ĝojon, estas limigita, kaj ke tiu, kiu kutimiĝis elspezadi monon per plena mano, per tio ne povas havigi al si pli da plezuro ol tiu, kiu kutimiĝis ĝuadi nur modestajn plezuretojn. Sinjoro fumanta dikan havancigaron, po unu dolaro, ne sentas pro tio pli grandan ĝuon ol viro, al kiu eĉ plej simpla pipo tiklas la palaton. Feliĉe la vivo estas tia kaj la homo tiel dotita, ke ni preskaŭ ĉiam povas adaptiĝi al nia ĉirkaŭaĵo kaj ke ni eĉ kapablas sentadi nin feliĉaj en la plej modestaj cirkonstancoj. Ĉar la feliĉo ja ne dependas de eksteraj, sed ĝi ekfloras el la interna kontenteco. Kaj kiu ĝustatempe scias agi, tiu eĉ dum plej malhela tago ekkaptas sunradion, kiu varmigas lin kaj heligas lian vivon. Se estas plenumitaj nur la plej urgaj vivbezonoj, se ni nur havas ion por manĝi kaj trinki, ion por nin vesti kaj tegmenton super nia kapo, tiam ĉiu el ni povas fariĝi feliĉa. Kiu opinias, ke multe da mono estas kondiĉo de ĉiu plezuro, tiu vere eraras. La riĉulo kutimiĝinta elspezadi la monon per plena mano, pro tio ne sentas plej malgrandan plezuron. Li konstante serĉadas novajn plezurojn, ĉar li rapide trosatiĝas, kaj tiu ĉi ĉasado al ĉiam pli fortaj sensacioj igas lin nerva kaj malĝoja.

La malriĉulo, kiu devas ŝpari ne nur sian monon, sed ankaŭ siajn plezurojn, ĝuas konscie kaj prudente. Eĉ homoj suferantaj pro tre peza sorto, kiel ekzemple blinduloj kaj kripluloj, ofte estas tute kontentaj kaj feliĉaj, ĉar ili alkutimiĝis al siaj cirkonstancoj kaj trovas kontentiĝon en la malmulto al ili restinta. La nombro da malkontentuloj estas multe pli granda inter la riĉuloj ol inter la malriĉuloj, ĉar al ili, kiuj ne posedas riĉaĵojn, la naturo ofte donacas internan ekvilibron kaj feliĉigan kontentemon.

JAKOBO SCHMID

La proksima Kongreso de K. E. F.

21-24 de majo 1925-a. -- Palma de Mallorca

Venu, karaj gesamideanoj, venu tien ĉi: insulo Mallorca atendas vin kaj la Palmaj samcelanoj deziregas manpremi la pretermarajn esperantistojn por kunfratigi kun ili dum kelkaj tagoj, en kiuj okazos la solena XII-a. Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio kaj la grandiozaj XI-aj. Internaciaj Floraj Ludoj, kies solenaĵoj estos tre sukcesaj kaj brilaj, laŭ informoj ricevitaĵ pri nia festaro, kiun honoros, krom niaj katalunaj samideanoj, samideanoj el diversaj landoj. Ni tre esperas, ke kune kun la pioniroj de nia movado neesperantistaj personoj ankaŭ venos viziti nian ĉarman insulon, kiel ĝi estas nomita de fremduloj, kiuj jam vizitis ĝin. Por ĉiuj nia proksima Kongreso estos interesa: post la laborkunsidoj, Floraj Ludoj, oficiala festeno, k. t. p., la kongresanoj dezirantaj ekskursi tra nia bela Mallorca povos fari tion, por kio kaj por detale sciigi la samideanaron pri la prezoj de la ekskursoj, tempo por efektiviĝi ilin, kondiĉoj de loĝado ĉe hoteloj, kosto de la veturo kaj fervoja vojaĝo, kongresa kotizo kaj aliaj sciigoj pri nia venonta Kongreso kaj ĝiaj amuzajoj, ni publikigos sur nia presorgano «Kataluna Esperantisto» la decajn informojn kaj notojn.

Decidiĝu, estimataj gekunbatalantoj, ĉeesti nian Kongreson; pretiĝu sukcesigi ĝin; entuziasme iru antaŭen, daŭrigu vian laŭdindan agadon kaj kiel ĉiam pruvu al la tuta mondo ke nia kara Esperanto ne estas mortinta lingvo, ke la kreaĵo de nia Majstro jam estas praktika kaj utila helplingvo por ĉiaj servoj kaj homaj bezonoj; klopodu varbi al nia movado plej grandan nombron da novaj samlingvanoj por la gloro de nia sankta afero kaj por la baldaŭ venko de ni dezirata; faru tion, mi petas, por honori la rememoron de la senmorta kaj neforgesebla D-ro Zamenhof.

Tial, ke dum nia Kongreso okazos la festo nomita Floraj Ludoj, al kiu prezentas literaturaĵojn ĉiulandaj verkistoj, mi altiras la atenton de la samideanoj, kiuj ankoraŭ, pro ilia nelerteco verki versaĵojn aŭ prozaĵojn, ne gajnis premion je la antaŭaj literaturaj konkursoj, kaj de tiuj, kiuj ne kuraĝis prezenti siajn verkaĵojn al la ĝisnunaj okazintaj konkursoj, pri tio, ke ili, sentime decidu partopreni la nomitan literaturan feston, ĉar la listo de premioj por niaj proksimaj Floraj Ludoj estas tre grava kal pli facile ol antaŭe kredeble, multaj samideanoj estos premiataj pro la multenombraj temoj laŭvolaj. La granda nombro da premioj estas sendube la unua sukceso atingita de la Organiza Komitato, kiu deziregas ke aliĝu kaj ĉeestu nian Kongreson, krom fremdaj samideanoj, la esperantistoj el ĉiuj hispanaj regionoj, kiujn ni tutkorĉ kaj frate invitas por tiu celo. Atentu, do, nian alvokon, karegaj kamaradoj.

Ĉiuj geesperantistoj venu Insulon Mallorca dum la venonta majo, por honori nian Kongreson!

Ni entuziasme kaj sincere atendas vin. Koran saluton al ĉiuj ĝis kiam estos eble povi ĉirkaŭpremi vin kaj amike premi viajn manojn.

NARCISO BOFILL

Prezidanto de la O. K.

Plena Listo de la Premioj por la XI^a Internaciaj Floraj Ludoj

Al la esperantistaj verkistoj:

La Komitato de la XI^a INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ viii salutas kaj invitas partopreni la jenajnu konkursojn.

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II. — Originala *Ama* verko en prozo

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — Traduko de la versaĵo «La Pastoreta». (Vidu antaŭan numeron)
- II. — Traduko de la prozaĵo «Via Blanquerua». (Vidu antaŭan numeron)

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

(La temo estas laŭvola, se oni ne difinas ĝin)

- I. — Premio de: S-ro Narciso Bofill, inĝeniero, Palma: 100 pesetoj.
- II. — S-ino Maria Fornaris de Bofill, Palma: 50 pesetoj.
- III. — F-ino Amàlia Bofill Fornaris, Palma: 50 Pesetoj.
- IV. — S-ro Antonio Rosselló, Direktoro de Compañia Mallorquina de Electricidad, Palma: 100 pesetoj.
- V. — S-ro José Salom, masonisto, Palma: 50 Pesetoj .
- VI. — S-ro Pedro J. Tous, Fabriko de maŝinoj, Palma: 100 pesetoj.
- VII. — S-ro Miguel C. Oliver, juĝisto. Palma: 50 pesetoj. Temo: Altaj konsideroj de ordo morala, religia, pedagogia, ekonomia kaj regiona kiuj konsilas la restarigon de la «Normal de Maestras» sub la gvido de la «Religiosas del Real Colegio de la Pureza» de Palma.
- VIII. — S-ro Mariano Jaquotot, Materialoj por konstruaĵoj, Palma: 50 pesetoj.
- IX. — S-ro Jaime M. Granada, Palma: 50 pesetoj.
- X. — Banko «Fomento Agrícola de Mallorca», Palma: 100 pesetoj.
- XI. — Banko «Crédito Balear», Palma: 100 pesetoj.
- XII. — «Fomento del Civismo», Palma: 50 pesetoj.
- XIII. — «Caja de Ahorros y Monte de Piedad de las Baleares», Palma: 50 pesetoj.

- XIV. — «Asociació per la Cultura de Mallorca», Palma: 50 pesetoj.
 XV. — «Banco Vitalicio de España», Palma: 50 pesetoj.
 XVI. — «Ferrocarril de Sóller», Palma: 50 pesetoj.
 XVII. — Ruĝa Kruco (Santa Catalina), Palma: pesetoj.
 XIII. — Prezidanto de K. E. F.: 100 pesetoj. Temo: Plej bona elekto kaj traduko de katalunlingvaj verkaĵoj de valenciaj aŭtoroj.
 XIX. — Sekretario de K. E. F.: 100 pesetoj. Temo: Plej bona elekto kaj traduko de katalunlingvaj verkaĵoj de rusiljonaj aŭtoroj.
 XX. — Episkopa Moŝto de Mallorca: 100 pesetoj.
 XXI. — Cámara Oficial de la Propiedad Urbana de Palma: 100 pesetoj.
 XXII. — Sociedad General de Tranvías Eléctricos, Palma: 50 pesetoj
 XXIII. — Esperantista Klubo Palma: 100 pesetoj.
 XXIV. — Oficiala Ĉambro de Komerco, Industrio kaj Navigado de Palma: 100 pesetoj.
 XXV. — Fomento de Turismo de Palma: artobjekto pri Palma.
 XXVI. — Asociación de la Prensa de Baleares: 50 Pesetoj.
 XXVII. — S-ro Fernando Ramírez, Sekretario de Delegación de Hacienda de Baleares: 50 pesetoj.
 XXVIII. — S-ro Miguel Guasp, ministestro, de Palma: 50 pesetoj.
 XXIX. — S-ro Antonio Coll, agrikulturisto, de Palma: 50 pesetoj.
 XXX. — Esp. Grupo «Ĝerona Espero», Girona: 50 pesetoj. Temo: Kanto al la latina maro.
 XXXI. — S-roj Ĉefoficistoj kaj Oficistoj de Poŝto, Palma: 100 pesetoj.
 XXXII. — S-ro Rafael Blanes, direktoro de «Kompanio de Fervojoj de Mallorca»: 50 pesetoj.
 XXXIII. — «Moŝta Kolegio de Prokuristoj», Palma: 50 pesetoj.
 XXXIV. — «Veloz Sport Balear», Palma: 50 pesetoj.
 XXXV. — «Mallorca Societo Protektanta de Bestoj kaj Plantoj», Palma: 50 pesetoj.
 XXXVI. — S-ro Bartolomé Font, pastro, Palma: 50 pesetoj.
 XXXVII. — «El Hogar del Porvenir», Palma: 50 pesetoj.
 XXXVIII. — «Moŝta Kolegio de Advokatoj», Palma: 50 pesetoj.
 XXXIX. — «Oficiala Kolegio de Farmaciistoj», Palma: 50 pesetoj.
 XL. — «Oficiala Kolegio de Kuracistoj», Palma: 50 pesetoj.
 XI.1. — «Federación Patronal de Mallorca»: 50 pesetoj.
 Inspiron al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo!
 Kolomano de Kalöksay, *prezidanto*. — Jakob Schmid. — Eŭsebio Artigas. — Narcis Bofill. — Fred. Pujulà i Vallès. — S. Alberich Jofrè, *sekretario*.

NOTOJ

I. — La aŭtoroj de la kvar premiitaj Ordinaraĵoj Temoj (*Originalaj Tekstoj I, II; Tradukitaj Tekstoj I, II*) ricevos laŭorde bele binditan ekzempleron

de la verkoj: Pro Iŝtar, Kataluna Antologio, La Tragedio de l' Homo, Fabiola. Se la merito de la premiitaj aŭtoroj de la *Tradukitaj Tekstoj I, II*, tion konsilas, oni premias ĝin per unu el la premioj por temo laŭvola.

II. — Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinariaj premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti Reĝinon de a Festo.

III. — La verkoj prezentotaj devas esti verkitaj en Plene *Fundamenta Esperanto* kaj ne ankoraŭ eldonitaj nek anoncigitaj.

IV. — La Festo de la XIaj. Internaciaj Floraj Ludoj okazos en Palma de Mallorca dum la XIIa. Kongreso de «Kataluna Esperantista Federacio» Majo 1925.

V. — Sur la manuskriptoj—kiuj devas esti ricevigitaj antaŭ la 15 de marto 1925 ĉe la Sekretario de la Floraj Ludoj (S-ro S. Alberich Jofrè, str. Bretón de los Herreros, 18, 1.^{er} 1.^a Barcelona) — oni devas skribi devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.

VI. — Manuskriptoj ne estos resendataj, eĉ se ili alvenis post la datolimo por la akcepto de verkoj. Oni konservu kopiou de manuskriptoj.

VII. — La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniu el la konkursoj.

VIII. — La komitato publikigos la veredikton per «Kataluna Esperantisto» kaj per la esperantaj kaj katalunaj gazetoj, kiuj bonvolos ĝin represi.

IX. — La premiitaj verkoj fariĝos propraĵo dum unu jaro de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur «Kataluna Esperantisto» aŭ aliaj Esperanto-gazetoj. Permeson por reprodukto dum tiu unua jaro oni devas peti de la Redakcio de K. E.

X. — Eventuala aljuĝo de «Subpremioj» nur signifas honoran mencion, ĉar ne estas aliaj efektivaj premioj krom tiuj difinitaj en la nuna alvoko.

LISTO DA VERKOJ RICEVITAJ

1. Un sonnet sans défauts vaut seul un long poème. — 2. En versfardo, formo estas funda. — 3. Versa tradukado estas rekreado. — 4. Kaj Dio la Eternulo konstruis el la riĉo, kiun li prenis de la homo, virinon, kaj Li venigis ŝin al la homo. Genezo, II, 22. Kaj Dio rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona. Genezo, I, 31. — 5. Lingvo sen Poezio estas korpo sen spirito: mortintaĵo. — 6. Finis coronat opus. — 7. Domine, da mihi pacem. — 8. Esperantistino. — 9. Avis rara. — 10. Vivanta strofo.

NOTO. — Una el la premioj por temo laŭvola estos aljuĝata al la plej bona propaganda lernolibro pri Esperanto por katalunlingvanoj.

Preseraroj. En nia lasta numero enŝoviĝis kelkaj preseraroj, kiuj estas korektitaj per la nuna represo.


KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ



DUA EPOKO - JARO III^a : 1923



Katedralo. — Flanka aspekto.


La scenurbo de la XII^a Kongreso de la F Internaci

Palma de Mallorca!... Nomo kiu elvokas rememorojn pri estintaj glo-
roj en ĉiu spirito kataluna!... Via gotika katedralo, kies belŝajnaj turpintoj
reflektiĝas en la trankvila akvo de la haveno, diras al ĵus alveninta vizitan-
to ion pri la plej prospera epoko de nia historio.

La reĝa palaco, fortikaĵo Templaris, kastelo Bellver kaj centoj da di-
versaj detaloj, prezentas al ni rememoron pri tiu tempo en kiu Katalunujo
estis unu el la ĉefaj ŝtatoj apud la Mediteranea Maro.

Sed nomante vin, Palma de Mallorca, estas ja kvazaŭ oni nomas vian
tutan insulon, kaj kio plej ĉarma faras vin estas la naturbelaj sidantaj
ĉirkaŭ vi por revigi la maristojn, kiuj albordiĝas por ripozado.

Kiam neniu homa piedo surpaŝis vian teron, dekojn da jarcentoj an-



Ĝenerala vida


na Esperantista Federacio, kaj de la XI^{aj} raj Ludoj

PALMA DE MALLORCA


taŭe, kiam via unua loĝanto ne estis stariginta ankoraŭ la unuan *dolmenon*, jam la naturo ĉizadis en via internaĵo, en la subtera mallumo, la mirindajn loĝejojn de gnomoj kaj feinoj, la senkomparajn grotojn kaj kavernojn Artà kaj Monacor.

Kaj sur via supraĵo la ondegoj modelis viajn abruptajn marbordojn, kaj formigis viaj ĉarmaj valoj parfumitaj de oranĝujoj kaj citronarboj.


Rigardinte vin kaj viajn fratinojn, la ceterajn balearajn insulojn, oritajn de la suno, kronitajn de mara ŝaŭmo elirinta el la ondoj kvazaŭ aro de ravaj sirenoj, la genio - fantazio de nia plej glora poeto, Jacint Verdaguer, enkorpigis la spiritan legendon pri via kreado, indan je la klasika mitologio.



o kaj haveno.



Vidaĵo de «Les Iletes», marbordo apud Palma.



Eksteraĵo de la Kastelo Bellver.

TABELO DE LA ENHAVO

- Baghy, Julio*: Stranga Danco, p. 8. — Dolora deziro, p. 65.
BIBLIOGRAFIO, J. G. C.: p. 14, 29, 44, 93, 109, 126. J. BREMON MASGRAU: p. 15.
BILANCO DE K. E. F. DE LA 1. OKTOBRO 1921 GIS 28. FEBRUARO 1923: p. 39.
Briggs, Louise: Kio plej impresis min en Katalunujo?, p. 86.
DIREKTA KOMITATO DE K. E. F.: p. 101.
ENLANDA KRONIKO: p. 94, 111.
FLORAJ LUDOJ, FRAGMENTOJ DE PAROLADOJ PRI: p. 122.
Grau Casas, Jaume: La kamenoj de la gastejoj (trad. el Prudenci Bertrana), p. 24. — Soneto al la Reĝino de niaj Floraj Ludoj, p. 40. — Kanto de 'Trobador', p. 87. — Belulino Iluzio, p. 102.
Grau Casas, Josep: Sanga nokto (trad. el Jacint Verdaguer), p. 6.
Grosjean-Maupin, E.: Prezidanta parolado de la IX^a Int. Floraj Ludoj, p. 73.
Guardiet, Romà: Sekretaria Raporto, p. 54.
IX^a INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ: Listo de ricevitaj verkoj, p. 5, 20. — Verdikto, p. 41. — Raporto pri la festo, p. 61.
X^a INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ: Alvoko, p. 104. — Aldono al la Alvoko, p. 118.
Isnard, Henri: Impresoj de Kongreso, p. 81.
Iu Afn, Lingvaj Respondoj laŭ la vulgara scio kaj saĝo de: p. 12, 22, 45, 92.
X^a KONGRESO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO: p. 4, 19, 34, 49.
Suplementoj kun gravuraĵoj: antaŭ-kongresa, post paĝo 40; postkongresa, post paĝo 64.
XI^a KONGRESO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO: p. 113.
NEKROLOGO: p. 91.
PROPONOJ RICEVITAJ, diskutotaj ĉe la Kongreso: p. 46.

- REDAKCIO DE «KATALUNA ESPERANTISTO»:** Als esperantistes catalans, p. 2.
— Kongreso de Iberaj Esperantistoj en Valencia, p. 3. — Stranga procedo, p. 17. — Esperanto en nia Specimena Foiro, p. 23. — Verkoj de Pujulà, p. 28. — Kongreso de Esperanto en Valencia, p. 32. — Parolado de S-ro Dalmau, p. 32. — Antaŭ la Kongreso, p. 33. — Lastmomentaj sciigoj, p. 43. — Als amics de «Kataluna Esperantisto», p. 96. — Nia Dekunua Kongreso en Vich, p. 112. — «Kataluna Esperantisto» mortas..., p. 128.
- Schmid, Jakobo:* Severa unueco, nepra kondiĉo de Internacia lingvo, p. 114.
- SENFADENA PAROLADO PRI KAJ EN ESPERANTO:** p. 110.
- Solà, Marian:* Sekretaria Raporto pri la IX^a Int. Floraj Ludoj, p. 61. — Raporto pri la XV^a Universala Kongreso en Niirnberg, p. 97.
- Torrents, Isidre:* La kalikota vesto (trad. el M. Alanic), p. 9.
- TRA LA GAZETARO, Gazetema:** p. 31.
- XVA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN NÜRNBERG:** p. 16, 30, 97.
- UNUA KONGRESO DE IBERIAJ ESPERANTISTOJ EN VALENCIA (Raporto de J. G. C.):** p. 88.



Eksterordinara kunsido de K. E. F.

21^a de Decembro 1924^a

En la granda salono de nia laulega sidejo, ĉe Ateneu Enciclopèdic Popular, okazis je la kvara kaj duono posttagmeze la Eksterordinara Kunveno de nia societo.

Ĉeestis ĝin la Direkta Komitato, multnombraj esperantistoj kaj reprezentantoj speciale delegitaj de la aliĝintaj prupoj: Nova Sento, Paco kaj Amo, Barcelona Stelo el Barcelona, Lumon el Terrassa, Aplec el Sabadell, Frateco el Vendrell; letere aliĝis aŭ proponis ŝanĝojn, kiujn oni legis aŭ pridiskutis, la grupoj Ĝerona Espero el Girona kaj Bela Espero el Manresa.

Nia Prezidanto S-ro Delfí Dalmau unue memorigas ke en tiu-ĉi monato plenumiĝas la datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, dato kiu preskaŭ koincidas kun la morto de lia fervora edzino S-ino Klara Silbernik, je kies memoro kaj kiel plej lasta saluto li petas ke ĉiuj ĉeestantoj starigu momente kiel signon de respekto.

Tuj poste li legas la proponon de la Direkta Komitato, koncerne la ŝanĝojn farindajn en la regularo de nia K. E. F., kaj jam publikigitaj en la antaŭa numero de nia gazeto.

Sendiskute estas aprokata la Tria regulo: Por bone plenumi la antaŭan paragrafon, K. E. F., eldonos gazeton, kies organizado estos regulata per speciala interna regularo prezentata de la redaktoro kaj antaŭe akceptata de la Direkta Komitato. Abonprezo de la gazeto estas 6 pesetoj po jaro.

Post longa diskutado en kiu partoprenas S-roj Grau, Amades, Torrents, Herp, Claramunt, Alberich, Solà, Dalmau, Comadran kaj aliaj, la paragrafo 4^a de nia regularo estas redaktita jene:

La K. E. F. konsistos el asociaj kaj izolaj membroj; la unuaj estos federaciaj per la grupo al kiu ili apartenas kaj la aliaj laŭ maniero privata.

La diversaj grupoj el kiuj konsistas la K. E. F. kontribuos al ĝia subteno per la monata kotizo da 0'10 ptoj. po membro kaj la individuaj membroj per minimuma kotizaĵo de 3'50 ptoj. po jaro.

Regulo 5.^a — La K. E. F. estos regata de Direkta Komitato, renovigebla ĉiujare, konsistanta el Prezidanto, Vicprezidanto, Sekretario, Vicsekretario, Kalkulisto, Kasisto, Administristo kaj kvar Voĉdonantoj.

Regulo 12.^a — Tiu ĉi Federacio agados se nur du organizitaj grupoj aŭ tridek izolaj membroj ĝin konsistigas. En okazo de disiĝo, post oficiala decido, la mono ekzistanta estos liverata al la kazo de la Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Esperantistaj Societoj.

Post la aprobo de la ŝanĝoj proponitaj al nia regularo, kies definitiva kaj jam korektita teksto, oni povas vidi kaj legi sur la koverto de nia gazeto, nia Prezidanto eklegis la leterojn interesanĝintajn kun la Prezidanto de Iberia Konfederacio koncerne nian aliĝon al tiu organizaĵo: unuanime

kaj sen ies kontraŭstaro estas aprobita la sinteno de nia Direktanta Komitato kaj oni decidis ne aliĝi materie al la Konfederacio sed alporti al ĝin nian tutan moralan aliĝon kaj helpon ĉiam kiam klopodo estas efektiva ĉe la Hispana Ŝtato.

Post propono estas elektitaj kiel Voĉdonantoj de nia Komitato, unu kiel anstataŭanto de S-ro Perez, ekstiginta, alia nova konforme al ĵus aprobita regularo, niaj karaj samideanoj S-roj Isidre Torrents kaj Lluís Domènech, ambaŭ el Barcelono.

S-ro D. Dalmau raportas al la ĉeestantaro pri la taskoj jam entreprenitaj por nia proksima Kongreso en Palma de Mallorca, kiu certe estos granda sukceso por la movado en nia lando, kaj oni decidis ke la kunveno montru sian estimon al niaj karaj Mallorca' j samideanoj S-roj Narcis Bofill kaj Joan Barceló.

Post tio ĉi la Prezidanto fermas la kunvenon je la sepa vespere.

La sekretario-raportanto
 MARIAN SOLÁ



Novaj perspektivoj.

Unuanime la partoprenintoj en nia eksterordinara ĝenerala kunsido alprenis la plej efikajn decidojn sendangerigi la fundamentojn de K. E. F. kaj larĝe malfermi la pordojn de ĉiufanka subteno al ĉiuj enlandaj esperantistoj.

Sur tiu ĉi numero ĉiu leganto trovos la grupanoŝanĝojn akceptitajn. Laŭ ili ĉiu grupo povas aliĝi al K. E. F. pagante tre malaltan kotizon po membro. Tiu malalte fiksita kotizo donos rajton al ĉiu grupano partopreni niajn kongresojn, voĉdoni pere aŭ senpere de komuna reprezentanto kaj, krom tio, kio estas plej grava, finance reguligos nian kason kaj efike akcelos nian movadon, kiu nepre bezonas la helpon de ĉiuj por paŝi rapide antaŭen.

Nia membraro grave kreskos tre kredeble. Nia reprezentanto ĉe la Konstanta Reprezentantaro akiros pli altan reliefon. La katalunaj esperantistoj atingos pli altan personecon en la mondo esperantista kaj fine havos solidan organizaĵon.

La kotizaĵo por izoluloj estas pli alte fiksita en la konvinko ke izoluloj ŝparas la subtenon de grupo kaj sekve povas pli multe elspezi por la ko-

muna organizaĵo, kiu ne dormante sur la akirotaj laŭroj komencos aktivan laboron por plikreskigi la ekzistantajn grupojn kaj laŭpove helpi la stariĝon de novaj en lokoj, kie la movado estas malvigla aŭ kie la afero malvarmiĝis kaj bezonas kunhelpon por antaŭeniri.

Ni estas certaj, ke ĉiuj grupoj sendos sian aliĝon al K. E. F. akceptante la novajn devojn, ke ĉiuj izoluloj tuj sendos ankaŭ sian kotizaĵon kaj fine ke ĉiuj fideluloj fervore laborados por ke en la daŭro de mallonga tempo ĉiuj esperantistoj de Balearaj Insuloj kaj Katalunujo estu en niaj vicoj.

Ĉiuj amikoj senlace laboru por ke la nova jaro estu la plej efika epoko de nia enlanda movado.

La demando pri la Iberia Esperantista Konfederacio estis solvita.

La regulo VIII de la citita Konfederacio diras: «Ĉiu federacio liveros al la Konfederacio ĉiumonate po 0'35 pesetoj por ĉiu konfederaciano». Nia federacio, kiu tiel longan tempon publikigas propran organon kaj internacie havas memstaran personecon, ne povas nek devas forlasi sian tradicion por transdoni al I. E. K. tiel gravan parton de la enspezoj. Tio estus memmortigo. Tio devigus nin al malaperigo de nia gazeto kaj forlaso de niaj entreprenoj.

Tamen, la gvidantoj de I. E. K. povas esti certaj, ke ni kun fervoro helpos ĉiun entreprenon, kiu bezonas komunan laboron.

Klara Zamenhof

Kiom da fojoj la viro povis atingi plej altajn bonojn por la homaro dank' al la fervoro kaj komprenema koro de virino! Klara ZAMENHOF estis por nia majstro la plej lojala helpanto en la tempoj malfacilaj.

Kiam Zamenhof bataladis kontraŭ antaŭjuĝo kaj skeptiko, en la teruraj horoj de malespero kaj doloro li trovis ĉiam en sia kamaradino la plej bonan komprenanton kaj instiganton. Ŝia alta koro kunfandiĝis en la lia kaj ambaŭ bataladis por la bono de l' homaro, kontraŭ mokado kaj indiferento.

Ne plu estas inter ni la heroino de nia movado. La batalantino falis. Ĉirkaŭ ŝi la tutmonda esperantistaro alten levas la standardon kaj kantas

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunuigi l'homaron.
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron....

Paĝo **por** **Lernantoj**
 (Pronuncieu: Pàtĵo por lernàntoi)
Pàĝina **per a** **Alumnes**

Esperanto, lingvo, Dio, homo, animalo, besto,
 Esperanto, llengua, Déu, home, animal, bèstia,
 vesto, mano, pano, vino, libro, brako, tablo,
 vestit, mà, pa, vi, llibre, braç, taula,
 akvo, tero, pomo, frukto, juneco, beleco, mal-
 aigua, terra, poma, fruit, juvenesa, bellesa, ve-
 juneco, malbeleco, kaj cetere, estas substantivoj,
 llesa, lletgesa, et cetera, són substantius,
 ĉar ili estas nomoj de personoj, animaloj aŭ
 perquè ells, són noms de persones, animals o
 aferoj konkretaj aŭ abstraktaj. — La substantivoj
 coses, concretes o abstractes. — Els substantius
 finiĝas per o, ekzemploj: litro, metro, teatro, afero,
 s'acaben amb o, exemples: litre, metre, teatre, cosa,
 plumo, papero, kraĵono, inko, telefono, strato, domo,
 ploma, paper, llapis, tinta, telèfon, carrer, casa,
 patro, frato, filo, filino, fratino, patrino, patreco,
 pare, germà, fill, filla, germana, mare, paternitat,
 frateco, fileco, teatreco, kaj tiel ĉiuj.
 germanor, filialitat, teatralitat, i així tots.

Ĉiuj vortoj en Esperanto havas la fonetikan
 Tots els mots en Esperanto tenen l' accent
 akcenton en la antaŭlasta silabo. Ĉiu vorto
 tònica a la penúltima sil-laba. Tota paraula
 havas tiom da silaboj kiom da vokaloj.
 té tant de sil-labes quant de vocals.

Bibliografio

Ni recenzas verkojn duope ricevitajn

ALBRECHT DÜRER. Vivo kaj verkado de la fama germana pentristo. 28 bildoj pri liaj verkoj kun biografio kaj klarigoj de Hans Kock-München. Eldonita de Sud-germana Esperanto-Eldonejo, Oskar Ziegler, Deisenhofen bei München, 1924, 48 paĝoj, 23 × 14. Prezo : 1.40 ormark.

Certe la verketo trovos la plaĉon, kiun la eldonintoj esperas de la esperantistaro. Zorge eldonita, korekte verkita, la libro fariĝas trezoro ne nur por esperantistoj sed por ĉiuj artsatantoj. La desegnaĵoj iafaje prezentigas kun eraroj kaj teknikaj malperfektajoj sed ĝenerale oni konstatas admirindan delikatecon kaj profundan senton de la fama Dürer.

Plezurege oni rigardas la akvareldesegnaĵojn «Kuniklo» kaj «Granda Herbaĵo» kaj la kuprogravuraĵon «Sankta Hieronimo». La esperantistoj faros al si grandan honoron aĉetante tiun ĉi grandan verketon. — SALJO.

AMAJ POEMOJ de Jaume Grau Casas. Eldonita de la aŭtoro, al kiu oni devas sin turni por aĉeto, str. Claris 72, Barcelona. 1924, 32 paĝoj, 17 × 12. Prezo : 1 peseto.

Ni malavare devas laŭdi nian poeton, ke li mem donis en bela libreto amason da poemoj, originalaj kaj tradukitaj, ĉe kies legado oni sentas la ravan inspiron de la verkinto. Malfacile oni povus diri, kiu poemo supers-taras alian, tamen, kiel brila perlo reliefiĝas kun dolĉa parfumo «Kanto de l' Trobador». El la tradukaĵoj el kataluna lingvo fariĝas aparte citinda la trafa traduko de «Beno de la Mangotablo», kies ritmo dolĉe sonas kun nekomparebla stilo.

Tre varme ni rekomendas al ĉiuj amikoj, ke ili baldaŭ havigu al si la allogan verkon de nia kara Grau. — SALJO.

KEINOTEKOISEN YHTEISKIELEN MAHDOLLISUUKSISTA JA ESPERANTOSTA. Parolado : Pri la eblecoj de artefarita komunlingvo kaj Esperanto, de H. Salokannel. Finnlando, 1924, 16 paĝoj. Prezo : 1 mk.

Broŝureto kuu celo propaganda por finnoj. La tekston mi ne povas juĝi ĉar mi ne scipovas finnan lingvon. Tiaj broŝuretoj en nia kataluna lingvo pri aspektoj diversaj de nia afero bone taŭgus por propagando en diversaj rondoj. — SALJO.

TRI LIRIKOJ de Shakespeare, muziko de M. Francis, vortoj tradukitaj de la eldoninto A. J. Ashley, Farnley, apud Huddersfield, Anglujo. 1924, 12 paĝoj. Prezo : afrank. L 0/1/7.

(1) Madrigalo (el «Measure for Measure» ak. 4, sc. 1) havas melodion dolĉan kaj inspiritan en sia trajto melankolika. La akompano bone ordigita kaj samtempe harmonia kompletigas ĝian belecon.

(2) Fidele (el «Cymbeline» ak. 4, sc. 2). La unua motivo estas melo-

dia kun akompano trafa por ĝi. La dua, gaja, estas ŝatinda kaj plena de fortikeco. La *Moderato* kaj *pli malrapide* estas el bela melodio kaj adekvata akompano, kio faras la komponaĵon laŭdinda.

(3) *Carpe Diem* (el «*Twelfth Night*» ak. 2, sc. 3). Ĉiuj ornamas en la komenco ludema gracio, kiu poste fariĝas melankolia, ripetigante en la unua taktero kaj finiĝante per ĝusta *rallentando*.

La vortoj estas ĝuste tradukitaj kaj konservis tra la traduko belan rimon. Mi rekomendas la verkon al ĉiuj muzikamantoj. — JOFRÉ.

SKOTLANDA PEJZAGO. Kolekto de vidaĵoj eldonitaj de Higgie & Co, Rothesay, Skotlando. 50 paĝoj. Prezo: 1 ŝilingo. Estas aldonita 32-paĝa broŝureto «Kondukanto en belega Skotlando». Prezo: 4 spesdekoj.

Belaj vidaĵoj, priskribo de la lando, moroj, historio, karaktero, k. t. p., tio en malbela Esperanto kaj multaj eraroj. — SALJO.

PRO IŜTAR, romano el la antikva Babela historio, originale verkita de H. A. Luyken. Kartone bindita volumo, klare kaj korekte presita, kun XXIII ĉapitroj kaj 304 paĝoj, 13 × 19 cm. Eldonis: Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, 1924. Prezo: 4 germanaj markoj.

Tiu-ĉi romano elspiras delikatan senton religian. «Iŝtar» estas la nomo de diino adorata de idoloj en la Babela imperio. La temo de la romano estas bataloj inter la fanatika Babela pastraro kaj la sekvantoj de malnova vera kulto al Jehova. Lemuel, la vera heroo de la romano, malkovras ĉiujn intrigojn kaj krimojn de la idolanaj pastroj, kaj penas defendi kontraŭ ili sian amikon Omar, kiu estas fidela al la religio de Jehova sed sentas amon por altranga kaj riĉa virino, Zalmuna, sekreta pastrino sin dediĉinta al Iŝtar. Pro Iŝtar, pro la deziro ke ĉiuj adoru ŝin, okazas multnombraj intrigoj en Betrah kaj en la urbego Babel, kiujn sukcesas venki la veraj kredantoj. Multaj interesaj scenoj okazas en la kortego, partoprenataj de la gereĝoj, de la ĉefpastroj, de la tuta popolo. En tiu-ĉi romano, kiun tre agrable oni legas, estas kelkaj figuroj tre bone desegnitaj, kaj ĝenerale ĝia argumento estas tre lerte disvolvita.

Tuj oni rimarkas ke la aŭtoro posedas profundajn historiajn konojn pri la koncerna epoko, ĉar en lia verko troviĝas amaso da tre interesaj detaloj arkeologiaj, lingvaj, pri popolmoroj, kortegaj kutimoj, k. t. p. Kelkaj priskriboj de palacoj kaj temploj meritas, per si solaj, la legadon de tiu dokumentite verkita romano. Ifoje ĝiaj paĝoj havas tiun «epokan guston», kiun havas «*Quo vadis?*» aŭ «*La Faraono*».

Ne la malplej interesa parto de «*Pro Iŝtar*» estas ĝiaj konsideroj filozofiaj aŭ religiaj. La verkinto sukcesas sentigi simpation al la figuroj defendantaj la simplan malnovan kulton, super la degenerinta kredo je idoloj. La tendenco estas en tiu romano, en kiu oni plendas la religian nefervoron de tiuj, por kiuj estas indiferece ĉu regas Jehova aŭ Baal. Tamen, unu el la romanpersonoj diras, ke tio opiniata de unuj herezo aŭ idolaĵo povas havi por aliaj veran kaj noblan emocion religian. El tiu eklektika vidpunkto

to, ni respektu ĉies religian senton kaj ne volu perforte trudi la nian. La tendenco, aŭ, pli bone la *gusto* de la romano «Pro Iŝtar», ne devas kaŭzi ke iu indiferentulo ne volu legi ĝin. Kiel dirite, ĝi estas multflanke atentinda.

Nun alvenis la *kritika* parto de tiu-ĉi recenzo. La stilo de «Pro Iŝtar» ĝenerale ja estas fundamenta, bona, sed en kelkaj okazoj ne tute internacia. Mi sentas en ĝi kelkajn naciismojn kiujn mi ne malŝatus en traduko (ĉar parto de la intereso de traduko estas la reflektiĝo de la spirito de la tradukita lingvo), sed kiujn mi tute kondamnas en romano *originale verkita*.

Mi trovas, se ne nekorekta, almenaŭ neeleganta, la uzadon de kelkaj prepozicioj. Ofte la aŭtoro uzas *per* kaj *en*, kie pli bone aspektus *de* kaj *dum*. Anstataŭ «via kuraĝo plenigas min *per* admiro» (p. 108), mi uzus *de*. Mi rezervus *per* por la okazoj similaj al tiu-ĉi: «ili plenigis la matracojn *per* lano». Kelkfoje S-ro Luyken uzas esprimojn, kiel ekzemple: *en la nokto*, kie pli taŭgus *dum*. Anstataŭ «vi superas *per* lerteco ĉiujn komercistojn» (p. 27), mi uzus *en*, aŭ *pri* aŭ eĉ *je*. Ni profitu la okazon por konstati ke la uzado de la prepozicioj estas la plej ŝanceliĝanta afero en Esperanto. Lerni la lingvon estas ja relative facile, sed lerni *literaturan stilon internacian* estas malfacilege.

Pli ol «frue en la tago» kaj «frue en la mateno», mi preferus «frumate-ne»; pli ol «en la daŭro de kelke da minutoj» (multfoje uzata), mi ŝatus «*dum* kelkaj minutoj». — En la frazo «aro da belaj brilantoj en formo de rikoltilo aŭ kvaronluno» (p. 9), estus pli bona la vorto «falĉilo» ĉar nur «falĉilo» havas difinitan formon. — Neŝatinda estas la esprimo «malmemoras» (p. 12). — Anstataŭ «kiuj pli ol sufiĉos por viaj persekutantoj» (p. 112), mi preferus «kiuj estos pli ol sufiĉaj» aŭ «kiuj pli ol necese sufiĉos». — Oftege estas uzata la formo «elveni»: en kelkaj okazoj mi ŝatas la nuancon, sed alportas nenian utilon uzi preskaŭ sisteme «elveni» anstataŭ «aperi». Ĉu eble baldaŭ oni diros «malelveni» en la senco «malaperi»? — En «fari arangojn por dumnokta loĝo» (p. 118), tiu «loĝo» ĝenas la orelojn kaj rompas ĉian tradicion kaj klasikecon. Ĉu en literaturaj verkoj sufiĉas nura gramatika korekteco kaj estas superflue sekvi la leĝojn de ia mistera harmonio? Ĉiam mi aŭdis pri «loĝado»; nur en tiu-ĉi okazo mi vidis «loĝo». — La vorto «noble» ankaŭ tute malplaĉas. Kial nuntempe kelkaj samideanoj deklaris akran militon kontraŭ helkaj snfiksoj? — En «Uzibitum sekrete volas enkonduki en nian regnon, kion li nomas pli liberalan reĝimon» (p. 189), devas esti «liberala reĝimo». — En la sekvanta frazo, aŭ la sintakso ne estas ĝusta, aŭ estas du nekorektaj akuzativoj: «En ŝi mi vidis animbeleon eĉ pli maloftan kaj pli brilan ol eksteran belecon» (p. 193). — Anstataŭ «kelke da minutoj poste Omar veturis» (p. 197), devus esti «kelkajn minutojn poste» aŭ «je kelke da minutoj poste». Mi ne vidas la kialon de obstina uzado de «kelke da» anstataŭ «kelkaj». —

Aliajn malgrandajn malbelaĵojn mi trovis ankoraŭ, esplorinte kun granda atento; sed ili ĉiuj konsistigas nur makuleton en la hela verko re-

cenzita. Mi montris nur la malbonan flankon : en la lingvaĵo de S-ro Luyken estas multaj perfektaj esprimoj, delikataj nuancoj, ŝatindaj parolturnoj kaj eĉ kelkaj fajreroj de originaleco.

La antaŭaj kritikoj, eble iom tro severe faritaj, havas kiel solan celon kontribui al la ĝeneraligo de bona internacia stilo, pri kiu ja ni ĉiuj bezonas pli-malpli perfektigi. Malgraŭ ĉio, la romano «Pro Iŝtar» estas ankaŭ el lingva vidpunkto plene rekomendinda, kaj ĝia aŭtoro, la eminenta kaj laborema samideano S-ro H. A. Luyken, kiu verkis jam kvar romanojn, meritas dankon kaj gratulon de la esperantistaro pro la laŭdinda kaj malfacila tasko verki longajn originalaĵojn.

J. G. C.



Fajreroj

Letero de Ed. Jung. — Amiko nia ricevis ĝin: — Strasburge, la 31. 12. 24. — Karega amiko! — Ĉu vi konas la nordan vintron? — La vetero estas malagrabla, jen suna kaj bela, sed malvarmega, jen varma aŭ almenaŭ varmeta, sed nuba kaj pluva, ankaŭ ofte malvarma kaj malseka samtempe. — La noktoj estas senfinaj, la tagoj mallongegaj. Je la tria kaj duono posttagmeze estas necese eklumigi la lampojn, ofte eĉ pli frue. Tiuj lampoj, kvankam bonaj, lumante dum sepo aŭ oko da horoj, lacigas la okulojn. — La homoj jen laboradas, jen amuziĝas, sed ĉiam pli-malpli malvarmumas. Ĉie tuso, nazkataro, raŭkeco, bronkito, kaj ceteraj - nordaĵoj. — Promenigi la nenjon, la patrino, ofte ankaŭ kuracistoj, malpermesas al la avo. Ili estas pravaj, sed kion faros la maljunulo, ne promenante kun la genepoj? — Li sopiras al lando de suno kaj floroj, al la bela Katalunujo; li sopiras al plantaro meze de l' vintro verdanta baj floranta, al la Blua Maro, al sennuba ĉielo, al riĉegeco je saniga varmo kaj lumo gajiga. — Li sopiras al suno bonfarto, ĝojo. — Kaj reve li forrapidas tra la Frankujo al la suda marbordo, trans la Pirinean montaron al la fama urbo de la Kvina Tutmonda Kongreso. — Katalunaj gesamideanoj neniam li vidis vin, sed vi ne estos nekona-tuloj por li. Li ricevas leterojn el Barcelona, kiuj komencas per la dolĉaj vortoj Karega amiko. Li legis poemojn kaj rakontojn de viaj poetoj: viaj kantoj estas de li aŭditaj, viaj kantoj kaj viaj sopiroj. — Kaj mallaŭte li kantas kun vi kaj kune sopiras, sopiras al ĝojo kaj feliĉo, al la triumfo de pako kaj amo, de ĉiu nobla sento. — Kaj je la lasta noktmezo de la mal-

nova jaro li salutas vin: ĝoju! ĝojegu! Kio estas kaj vera bona kaj nobla ne povas malvenki. Alproksimigos nin ĉiujn la venonta jaro al la glora fincelo. — Koregan bondeziron! koregan manpremon! El la suna lando li reiras en la vintran hejmon, kontraŭ nebulon kaj froston kaj malpacon hardite per samcelana varmo kaj lumo kaj amo. — Via sindona. — E. JUNG.

Esperanto-movado. — Palma de Mallorca. Ĉe la ĉi-tiea loka grupo «Esperantista Klubo Palma» de la oktobra monato S-ro Narciso Bofill klarigas ĉiusemajne tri klasojn pri Esperanto al novaj kaj malnovaj gesamideanoj, membroj de la nomita societo, kies nombro da geanoj pligrandiĝis pro la okazigo en tiu ĉi urbo de la proksima kongreso de K. E. F.

Por premioj la multnombrajn gelernantojn oni aljuĝos al ili, per ekzamenoj, valorajn objektojn argentajn, dum la venonta printempo. La nomitaj premioj estas donacitaj de fervora kaj entuziasma samideano el Palma, malnova kaj kuraĝa pioniro de nia movado.

La loka Organiza Komitato de la XII Kongreso de K. E. F. konsistas el S-roj Narciso Bofill, prezidanto, Bartolomé Font, Mariano Jaquotot kaj Juan Soler, kiuj samideanoj estas kore kaj varme gratulitaj, por ilia tasko organizi nian Kongreson, de la Grupo «Esperantista Klubo Palma» kaj de multaj samlingvanoj loĝantaj en insulo Mallorca. La nomita Organiza Komitato ankaŭ ricevis multe da aliĝoj kaj atingis gravan liston de premioj por niaj XI Floraj Ludoj.

Laŭ sciigoj kaj priinformoj, niaj okazontaj Kongreso kaj Floraj Ludoj estos grandiozaj kaj solenegaj.

Lingva komitatano propagandas kontraŭ nia movado. — S-ro Mangada, la internacie konata ploremlu, predikanto de Homaranismo (sic), havas trabon en la okulo. La trabo estas la sukceso de nia gazeto, Federacio, movado kaj la entuziasmo, kiun niaj Balearaj samideanoj dediĉas al la proksima Kongreso. Por malsukcesigi la Kongreson kaj veki publikan antaŭjuĝon kontraŭ ĝi, li publikigis en kongresurba ĵurnalo artikolon dirante sensencaĵojn kontraŭ la katalunaj esperantistoj kaj invitante la palmanojn rigardi la tutan aferon kun singardemo. Feliĉe nia Kongreso havas energian defendanton, kiu trafe senmaskigis kaj ridindigis la polemikemulon.

Sed ni ne komprenas kial S-ro Mangada ne akceptis la leteron de la prezidanto de K. E. F. aperintan en nia lasta numero, kaj preferis daŭrigi la mallojalan agadon anstataŭ diskuti senpere kun ni forlasante la subfosadon por impliki nin en politikan aferon.

Estas tre bedaŭrinde ke lia malamo al katalunlingvanoj donas frukton kontraŭ Esperanto. Ŝajnas al ni ke membro de la Lingva Komitato devas kompreni la principojn de Esperanto por ne fari per ĝi defendadon de siaj privataj opinioj, kiuj estas kontraŭ la fundamento de Esperantismo.

Katalun-Esperantismo. — Ĝis nun ni ofte legis kaj aŭdis, ke estas en ĉiuj landoj katalunaj artistoj, komercistoj, laboristoj, politikistoj, k. a. — Ni

fiere diru nun estas katalunaj esperantistoj, kiuj bruligas esperantan fajron en tiuj landoj, kiuj marŝas en la malantaŭo de nia movado. Efektive: Kiam nia prezidanto, antaŭ naŭ jaroj, semadis en Bahía Blanca, katalunoj ankaŭ estis jetintaj la unuajn semojn en Buenos Aires, kaj en Rosario de Santa Fe semadis nia samlandano Santiago Gomis. Kaj jen en la novjaraj tagoj de 1925 alvenas al ni du komunikajoj de katalunoj kiuj transmare, en latinamerikaj landoj semadas Esperanton senĉese: F-ino A. Vilaró kaj S-ro J. Rocafull en Buenos Aires, S-ro J. Gili Noria en Colombia, S-ro Santiago Gomis en Montevideo, S-ro B. Zannon en Havana. Nia plezuro estas des pli granda ĉar tiu ĉi fajrero fariĝos plene internacia kun la aldono ke ni ĝojis kunvivi en Katalunujo kun la meksika S-no Guerra el Tampico, la ĉeka samideanino A. Hrbáčková el Zlín, kaj S-inoj Zamora el la geografie malproksima orienta Manila, kiuj ĉiuj estis en nia lando dum la ĵus pasinta decembro.

Feliĉa homo. — Antaŭ kelkaj semajnoj en «Institución Ballbé» (Barcelona), S-ro Bernardo Obrador paroladis pri lingvoj mortintaj kaj mortontaj, ne forgesante Esperanton. La oratoro inter aliaj eraraj konceptoj pri nia lingvo diris, ke ie li legis pri trupo de aktoroj, kiuj volas entrepreni vojaĝon tra la tuta mondo prezentante per Esperanto la ĉefverkojn el diversaj nacioj. Ni bedaŭras, ke oni ne sendas al ni ĉiujn esperantajn gazetojn kaj ke pro tio ni ne povis sciigi pri tiel grava afero ĝustatempe. Sed kio estas eksterordinare epokfaranta estas tio, ke tiu S-ro, responde al la atakoj de diversaj esperantistoj, kiuj forblovis lian kastelon, diris, ke dum la V Kongreso en Barcelona la diversaj naciaj delegitoj devis alpreni francan lingvon ĉar per Esperanto ne estis eble interkompreniĝi. Feliĉa homo, ke li eltrovis la netaŭgecon de Esperanto post 37-jara elprovado.

Reformemuloj Schneeberger, idestro kaj Antido, esperantidestro, interŝanĝis leterojn. La unua bedaŭras, ke la dua ne transiris rekte al ido kaj Antido klarigas, ke se li forlasus la entreprenon, li *rukvenus* ne al ido sed al Esperanto. Ni konsilas al ambaŭ reformistoj *rukveni* definitive al Esperanto kaj ke ili forlasu la *rukon*. Ni estas lacaj je tiom da *rukvoj* dupiedaj. Ĉu vi komprenas nin, katalunlingvanoj? Jes, do sufiĉe.

Ĉu flavaj, ruĝaj aŭ senkoloraj? — Iu sin turnis al ni plendante, ke nia Federacio estas neŭtrala kaj ke pro tio li ne povas subteni nin. Alia proteste kriadis, ke niaj Kongresoj pro la diservo kaj ĉeesto de pastroj estas pli taŭgaj por katolikoj, kaj tria, pro artikolo aperinta en unu el niaj lastaj numeroj, argumentis, ke ni fariĝis kontraŭkapitalistoj. Ĉu efektive el ni radias tiom da diverskoloraj nuancoj?

Radiodiletantoj. — La stacioj Hamburg, Leipzig, München, Breslau kaj aliaj disaŭdigas lecionojn pri Esperanto kun sukceso eksterordinara. Ĉu ni ne sukcesus enkonduki tian disaŭdigon en Radio-Barcelona? Helpu, helpu kaj helpu.

Ekzamenoj pri lernado, kapablo kaj profesoreco, en Palma de Mallorca. — Dum nia proksima Kongreso en Majo, ni okazigos ekzamenojn por aljuĝo de atesto al la esperantistoj kiuj pruvos tra ekzameno ke ili konas profundete, profunde aŭ profundege la gramatikon kaj la internacian lingvon. Ni, do atentigas ĉiujn kursanojn kaj jam lertajn gesamideanojn, ke ili pretiĝu por atingo de atesto. — Por pruvo de «lernado» de gramatiko kaj Esperanto sufiĉas freŝa kaj konscia lerninteco de la «Gramàtica» (curs mitjà) de Pompeu Fabra. kaj de la «Ekzercaro» de la Zamenhofa Fundamento. Por pruvo de *kapablo* estas ankaŭ necesa la kono de «Esperanta Sintakso» de Paul Fructier. Kaj por pruvo de *profesoreco* estas ankaŭ necesa la kono de «Lingvaj Respondoj» de Zamenhof kaj «Converses Filològiques» de Pompeu Fabra. — Bonaj helpaj libroj estas la «Gramàtica Raonada d'Esperanto», de F. Pujulà i Vallés, la vortaro Kabe kaj la «Oficiala Klasika Libro de Esperanto, kolekto de la Akademio, eldonita de Esp. Centra Librojo, 51, Rue Clichy, Paris (9.e).

Propagandaj Markoj de nia proksima Kongreso. — Diverskoloraj estas eldonitaj. Aĉetindaj kaj acetebraj kontraŭ sendo de ptoj. 1'50 aŭ egalvaloro, por 100 markoj, al nia adreso de K. E. F., Carrer Carme, 30-Barcelona.

Imitinda Ekzemplo. — Nia kara samideano Barceló, el Palma de Mallorca, kiu, bedaŭrinde troviĝas nun en Maroko, mendis ĉiujn necesajn librojn por sia pretigado partopreni la ekzamenojn pri profesoreco dum nia proksima Kongreso en la baleara ĉefurbo.

Nova kurso de Esperanto. — En la Grupo «Barcelona Stelo», kiu ĝojige revigliĝas, komenciĝis kurso gvidata de nia lerta samideano Eduard Capdevila.

Aliĝoj al la Iberia Konfederacio. — Ĉiuj membroj de K. E. F. kaj abonantoj de K. E., kiuj deziras aniĝi de la Iberia Konfederacio estas petataj fari la pagon al la prezidanto de K. E. F., kiu bonvole transsendos kaj efektivigos la aliĝojn. La kotizo al la Iberia Konfederacio kostas 0'35 ptoj. ĉiunonate t. e., ptoj. 4'20 ĉiujare.

Iberia Kongreso. — Kelkajn tagojn antaŭ nia proksima Kongreso en Palma de Mallorca okazos en Kordovo la nunjara Kongreso de la Iberia Konfederacio. Plezure ni sciigos detalojn en venontaj numerj de nia gazeto.

Averto al nepagintoj. — Dank' al monhelpo de samideanoj Bofill, Bremont, Amades, Gili, Codorniu, Pellicer, Alberich, Solà, Domènec, Serrat, Sales, Dalmau kaj aliaj, nia K. E. F. finis la pasintan jaron sendeficite. La nova organizo de K. E. F. eble permesos, krom aperigo de nia gazeto regule, la eldonon de necesaj verkoj por propagando kaj lernigo de Esperanto. — La nepagintoj bonvolu tuj kvitiĝi kun K. E. F., kaj notu ke ili estos eksigitaj kiel abonantoj kaj federacianoj se antaŭ la 15^a de Februaro ili

ne sendos ŝulditan monon por la nuna jaro kaj antaŭa. Por nefederacianoj la aliĝo al la Palma Kongreso kostos ptoj. 5.

La pagoj por K. E. F. — Por faciligo de la pagontaj ni pretigis akceptejon de pagoj de jarabonoj de nia gazeto (ses pesetoj en Iberio kaj Amerikaj landoj, kaj ses svisaj frankoj aŭ unu dolaro en la ceteraj) kaj aliĝoj de grupoj kaj individuoj al la Kataluna Esp. Federacio, en la adreso de la Prezidanto, Carrer València, 245, Barcelona.

Servoj de K. E. F. al la Grupoj. — Gazetoj Esperantistaj el ĉiuj nacioj estas sendantaj de nia Federacio al la Grupoj por sciigo al ĉiuj niaj samideanoj pri la tutmonda batado de nia Movado. Okaze de novaj kursoj aŭ aliaj motivoj la Grupoj organizu propagandajn paroladarojn kaj ekspoziciojn, por kio la K. E. F. estas preta plenumi petojn pri oratoroj kaj konsiloj.

Novaj Komitatoj: — Elektita ĉe «Barcelona Stelo»: Prezidanto: S-ro Jaume Grau Casas; Vicprezidanto: S-ro Antoni Durà; Sekretario: S-ro Eduard Capdevila; Vicsekretario: S-ro Jaume Pruna; Kasisto: S-ro Manuel Monró; Kalkulisto: S-ro Manuel Palomeras; Bibliotekisto. S-ro Amadeu Gongga; Voĉdonantoj: S-ro Joan Gili Norta, S-ro Jesús Lorenzo, S-ro Andrés López, S-ro Acraci Blanc. Elektita ĉe «Paco kaj Amo»: Prezidanto: S-ro Josep Roig; Vicprezidanto: S-ro Pere Torres; Sekretario: S-ro César Gallego; Vicsekretario: S-ro Lluís Domènech; Kasisto: Bohigas Ferràn; Kalkulisto: S-ro Tomàs Alberich; Voĉdonantoj: S-ro Joan Fuster, S-ro Miquel Gabarró, S-ro Ramon Roig, S-ro Josep Alberich kaj S-ro J. Font.

La Enciclopedia Espasa, kiu enhavas esperantan tradukon de ĉiu vorto, apud franca, angla, itala, germana kaj kataluna traduko. Ĝi estas verkego el kiu jam aperis kvardek dumilpaĝaj volumoj kaj estas ankoraŭ aperontaj dek kvin-dudek plu. La ĝis nun aperintaj kostas ĉirkaŭ mil sescent pesetoj.

Vi povas aĉeti nian gazeton ĉe la Barcelonaj grandaj librejoj «Catalonia», Plaça Catalunya, 17; «Nacional i Estrangera» Rambla Catalunya, 72, i «Italiana» Rambla Catalunya, 125. Ĉi-tiu numero de K. E. estas pli ol duobla, kaj ĝia prezo po ekzemplero estas unu peseto.

Pri nia proksima Kongreso en Palma. — Responde al insista peto de ĉiuj gesamideanoj, kaj por gvido de ilia pretigo, ni diru ke la prezo de ŝipveturo inter Barcelona kaj Palma, *iro kaj reveno*, estas: en tria klaso, pesetoj 33' —; en dua klaso, 65'—ptoj.; kaj en unua klaso 105'—ptoj. La veturo ordinare okazas kaj daŭras de la 8^a vespere, enŝipiĝo, ĝis la sepa matene. La vaporŝipoj estas tre bonaj. — La loĝado kaj manĝado en Palma kostas 30-30^o/_o malpli ol en Barcelona.

La nuna numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la milita cenzuro.

Els Metges i l'Esperanto

El Sr. George E. Vincent, President de la «Rockefeller Foundation», diu en el «Belfast Evening Telegraph» que la Ciència és el gran llenguatge internacional — el veritable Esperanto. Els seus resultats vénen a dir el mateix a París i Peking que a Hong-Kong. No hi tenim res a objectar. Però no n'hi ha prou que els resultats més o menys indiquin el mateix. És imprescindible que el metge de París sigui capaç de comunicar els seus descobriments al metge de Peking en una llengua que aquest darrer pugui comprendre. Els fets científics han de vulgaritzar-se amb una sola traducció per a tot el món. El Itatí, qui antigament acomplia aquest servei, no és ja recomanable. Adhuc posseeix més d'una sola forma avui dia. Nosaltres ens permetem d'aconsellar al Sr. Vincent que aprengui tot seguit l'Esperanto i s'adhereixi a la «Societat de Metges Esperantistes». Aquesta important organització es reuneix fa unes setmanes a Viena, on totes les qüestions es resolgueren enterament mitjançant l'Esperanto. Es llegiren conferències pel Dr. Austerlitz (Txecoslovàquia) sobre ço que manca en l'educació mèdica; el Dr. Blassberg (Polònia) sobre insulinoteràpia; el Dr. Primmer (Anglaterra), sobre sueroteràpia; i el Dr. Sos (Àustria) sobre pyrrihoea. L'òrgan oficial de la dita Societat conté sempre les últimes notícies de descobriments, etc., extretes de totes les fonts del món i presentades en forma abreujada.

(Nota extreta i traduïda de la revista anglesa «International Language».)

«Kataluna Esperantisto»

ĈIUMONATA 16 PAĜA GAZETO

OFICIALA ORGANO

DE LA

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Plej bonaj Verkaĵoj de Plej bonaj aŭtoroj ĉieaj

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono 6 svisaj frankoj aŭ egalvaloro efektivigbla en Barcelona

Adr.: Carrer Carme, 30. — BARCELONA

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anoton rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi tekston.

ESTATUTS DE LA K. E. F.

ARTICLES REFORMATS

ARTICLE TERCER. — Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu. El preu d'abonament a la revista serà de 6 ptes. l'any.

ARTICLE QUART. — La «F. C. d'E.» constarà de membres associats i de membres isolats; els primers seran federats per mitjà de la entitat a la qual pertanyen i els altres amb caràcter particular.

Els diversos organismes pertanyents a la «F. C. d'E.» contribuiran al seu sosteniment amb la quota mensual de 0'10 ptes. per cada un dels socis que els integrin i els individuals amb una quota mínima de 3'50 ptes. l'any pagada per endavant.

ARTICLE CINQUÈ. — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu, renovable cada any. compost de President, Vice-president, Secretari, Vice-secretari, Comptador, Caixer, Administrador i quatre Vocals.

ARTICLE NOVÈ. — Tots els esperantistes pertanyents a organismes federats, igual que els membres isolats, tindran veu i vot en les assemblees anyals, però llur vot serà delegable a un altre federat lliurant-li, el membrokarto de presentació necessària per a votar en nom propi i d'altres federats.

ARTICLE DOTZÈ. — Aquesta federació podrà actuar mentre compati amb dues col·lectivitats organitzades o bé trenta membres isolats. En cas de dissolució l'actiu serà lliurat a la caixa de la Konstanta Re-presentantaro de la Naciaj Societoj Esperantistaj.